

**Redakcia noto:** 100-jara Grzimek, 200-jara Darwin

Por rapidigi investojn (dum la nuna financkrizo) iu bavara ministro volas estonte limigi la naturprotektadon: temporabaj medioakordiĝemaj ekzamenoj por malkovri ekzistodanĝerojn por bestoj kaj plantoj invitus al misuzo. Ĉiu ajn ja povus – per “ne certigitaj pretendoj pri la ekzisto aŭ endanĝerigo de malofta specio” – bloki la celatajn investojn por vivteni la trafikon kaj la aŭtomobil-industrion, kaj unu el la tiucele de naturprotektantoj “preferata fantom-besto” ekzemple estus la malgranda “tre timema kaj sinretenema muskardeno”.

Jes, la muskardeno estas nur malgranda besto. Sed la bavara ministaro eble rigardu ĉirkaŭen, kion faras la homo kun pli grandaj bestoj kaj viv-regionoj, kaj kial la homo ne forgesu investi por la protektado de nia vivo-medio: sufiĉe bone videblas la sekvoj de la klimatoŝanĝiĝado kaŭzita de la homo:

<p><u>en Arкто</u></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>- ŝrumpado de glacibaroj, bankizoj kaj glaĉeroj</li> </ul> <p><u>en Eŭropaj maroj</u></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>- marnivelo plialtiĝas</li> <li>- akvotemperaturoj plialtiĝas</li> <li>- vivaĵspecioj retiriĝas norddirekte</li> <li>- fiŝaro endanĝerigita</li> </ul> <p><u>en nordokcidenta Eŭropo</u></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>- pli fortaj pluvoj dumvintraj</li> <li>- plialtiĝo de la danĝero pro inundoj riveraj kaj marbordaj</li> </ul> <p><u>en Mediteraneaj regionoj</u></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>- malpli da atmosferaj precipitaĵoj</li> <li>- plialtiĝo de danĝero de arbarincendioj</li> <li>- malabundaj rikoltoj</li> <li>- pli da mortintoj pro varmego</li> <li>- endanĝerigo de speciomulteco</li> </ul>	<p><u>en norda Eŭropo</u></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>- malpli da neĝo kaj glacio</li> <li>- plialtiĝo de inundodanĝero</li> <li>- pli longaj kreskadoperiodoj</li> <li>- malpli da energikonsumado dum hejtperiodoj</li> <li>- pli da dumvintraj ŝtormdanĝeroj</li> </ul> <p><u>en centra kaj orienta Eŭropo</u></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>- temperaturaj ekstremoj</li> <li>- malpli da someraj precipitaĵoj</li> <li>- dumvintra inundodanĝero</li> <li>- plimultiĝo de arbarincendioj</li> <li>- pli multspeca agrara kulturado</li> </ul> <p><u>en montaraj regionoj</u></p> <ul style="list-style-type: none"> <li>- temperatura plialtiĝo</li> <li>- glaĉera fandiĝado</li> <li>- malpli da permfrostregionoj</li> <li>- pli da terdeglitoj kaj erozioj</li> <li>- alta risko, ke specioj formortu</li> </ul>
---	--

Antaŭ 200 jaroj naskiĝis *Charles Darwin* kaj antaŭ 100 jaroj naskiĝis *Bernhard Grzimek* – du homoj, kiuj dediĉis sian vivon al la scienco kun “Respekto antaŭ la vivo”. Ankaŭ politikistoj ekkonu, ke ilia rolo en publiko kiel demokratiaj reprezentantoj estu zorgi kun respekto antaŭ la vivo pri nia medio, kiu estas nepre necesa por homa pluvivado.

-sa

**Originalaj artikoloj****2009 – la Jaro de la Gorilo**

Rüdiger SACHS

**Enkonduko**

Dum renkontiĝo en *Kobe*, Japanujo, je la 15-a de oktobro 2009, d-ro *OSAMU Ishikawa*, veterinaro kaj zoodirektoro de la urba “*Oji Zoo*”, montris al mi kaj la min akompananta grupo de esperantistoj la specialan ekspozicion pro la nuna “Jaro de la Gorilo”. Mi ne havis konon pri tiu ĉi mondovasta evento. Ĉu pri tio sciis la postministrejoj oficistoj en Germanujo? Mi dubas. Sed ili elektis el la proponoj por



poŝtmark-eldono omaĝe al la nuna centjariĝo de la fama naturprotektanto *Bernhard Grzimek* ĝuste la dezajnon “televizidprofesoro kun gorilo”! Kia koincido!

**Bildo 1:** Ekzakte je la Ĝjimeka naskiĝdatreveno, la 24-a de aprilo 2009, aperis tiu ĉi poŝtmarko de la germana poŝtministerio memore de lia centjariĝo.

Reen al la japanuja “*Oji Zoo*”. En bona etoso mi lernis multon pri goriloj kaj la minacoj al tiu besto, pri kiuj suferas ankaŭ aliaj grandaj simioj kaj sovaĝejaj primatospecioj. En la sekva teksto mi provas kunmeti la fakajn informojn kaj prigorilajn klarigojn de mia japana veterinarokolego.

**Specio endanĝerigita de forpereo**

La grandaj nehomaj primatoj, kaj precipe la plej altstatura el ili, la gorilo, jam ĉiam estis bazo de inspiro kaj fascino por homoj. Ĝia proksima rilato al la homo iel elstarigas kaj apartigas ĝin el nia ideo pri “bestomondo”. Genetikaj analizoj montris, ke la goriloj kaj homoj dividas 98,4% de siaj genoj. Goriloj posedas memzorgadon, rimarkeban inteligentecon kaj la eblon komuniki per signoj kaj simboloj, same kiel ili kapablas celkonscie uzi certajn bazajn ilojn. La hom-similaj bestoj eligas emociojn kiel ĝojo kaj malĝojo simile al homoj.